n-ro 1, Januaro-Aŭgusto 2011

# ESPERANTO*INFO

*Informilo de Kataluna Esperanto-Asocio

La jara ordinara asembleo de Kataluna Esperanto-Asocio okazis la 19an de marto en Barcelono. Krom raporti la pasintjarajn agadon kaj bilancon kaj aprobi tiujn ĉi-jarajn, oni renovigis la kontrolan komisionon kaj la estraron. Unu el la plej elstaraj asembleaj decidoj realiĝas per la bulteno kiun vi havas ĉe-mane. Oni decidis pri du periodaĵoj: tiu ĉi bulteno, fizike pli modesta, por la membroj, kaj daŭre *Kataluna Esperantisto* pli bele prezentita kaj intelektule nivela.

Ĉiujn informojn kiujn vi legos en tiu ĉi nova bulteno, vi povas legi pli akurate en nia retejo <*www.esperanto.cat*> esperante kaj katalune.

Ferriol Macip

## SALVAT-PAPASSEIT EN ESPERANTO EN KULTUREJO ARTS SANTA MÒNICA

Pasintan 22an de oktobro, Llibert Puig, Montserrat Parera, Éric Collignon kaj Ramon Perera surbendigis, en studio de Sabadell, poemojn de Joan Salvat Papasseit por la ekspozicio „Salvat-Papasseit, avangarda poeto" organizita far kulturejo Arts Santa Mònica de la Rambla de Barcelona, kie ĝi okazis, kaj la Instituto de Kataluna Beletro inter la 23a de decembro kaj la 3a de aprilo. Unuaj kontaktoj kun Centro de Esperanto Sabadell okazis danke al iniciato de Núria Coll, tragike forpasita en la lasta somero. La legitaj poemoj apartenis al la poemaro *Poemo de la rozo* sur la lipoj kaj estis „*Kia kajto mia stelo*", „*Mi lasos l' urbon*", „*Ŝia rigardo*" kaj „*Mi amas la aromon*" en belega traduko de la verkisto Abel Montagut.

Éric Collignon

## RENKONTIĜO EN CASSÀ DE LA SELVA

Kataluna Esperanto-Junularo organizis la ĉi-jaran 7an Internaciisman Renkontiĝon kadre de la Iberia Serio en sia 7a eldono, organizata ĉiun jaron laŭvice de portugaloj, hispanoj kaj katalunoj. La Renkontiĝo okazis la 13an, 14an kaj 15an de majo en la regiono de Ĝirono: en Sant Andreu Salou, en Cassà de la Selva kaj en Ĝirono. Partoprenis sepdeko da esperantistoj kaj Esperanto-amikoj venintaj el diversaj mondopartoj: Germanio, Arpitanio, Kastilio, Estonio, Francio, Italio, Okcitanio, Pollando, Rusio kaj eĉ Japanio.

Post akceptado en la urbodomo de Cassà fare de la urbestro kaj la magistratano pri kulturo, ni iris al la loka biblioteko kie Kataluna Esperanto-Asocio faris malavaran libro-donacon por la nova priesperanta sekcio. Reprezentanto de Hispana Esperanto-Federacio kontribuis al la donaco per ekzemplero de la libro *El hombre que desafió a Babel*.

Ferriol Macip

## PUBLIKA LEGADO DE „LA ETA PRINCO"

Dimanĉon la 15an de majo kun la Asocio de Amikoj de la Eta Princo kunlaboris Kataluna Esperanto-Asocio por la legado en la internacia lingvo de la libro de Saint-Exupéry en la barcelona Plaça del Rei.



OLIVERAS FOTÒGRAF

**ESPERANTO* CAT**

*Associació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe „Generalitat de Catalunya„ en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Kotizoj por la jaro 2011:
individua abonanta membro, 64 eŭroj; pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.


Banko: Caixa d'Enginyers,
Agència 001, Barcelona
Kontonumero: 3025 0001 15 1433398158
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158
UEA-konto: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato:
Prezidanto: Carles Vela;
vicprezidanto: Josep Franquesa;
sekretario: Ramon Perera;
vic-sekretario: Víctor Solé; kasisto: Sebastià Ribes; voĉdonantoj: Àngels del Pozo, Llibert Puig kaj Montserrat Franquesa.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental),
Països Catalans/Kataluna Landaro
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633
Ret-adreso: info@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat

Eroj de la teksto sin sekvis en diversaj lingvoj. Multnombra publiko ĉeestis atente ĝis la fino, kiam estis aŭdebla en Esperanto la fama demando de la eta princo: „Rigardu la ĉielon! demandu vin: ĉu, jes aŭ ne, la ŝafeto manĝis la floron? Kaj vi vidos kiel ĉio aliiĝas...”

Montserrat Franquesa




*Multnombra publiko ĉeestis atente ĝis la fino, kiam estis aŭdebla en Esperanto la fama demando de la eta princo: „Rigardu la ĉielon! demandu vin: ĉu, jes aŭ ne, la ŝafeto manĝis la floron? Kaj vi vidos kiel ĉio aliiĝas...”*

## ALTNIVELA ESPERANTO-KONGRESO EN EL ESCORIAL

Mi partoprenis la 70an Hispanan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en San Lorenzo del Escorial (apud Madrido) de la 28a de junio ĝis la 2a de julio, sufiĉe longa kongreso en bela kaj impona urbo.

El la bunta programo elstaris tri altnivelaj atelieroj gvidataj de kleregaj homoj: Jorge Camacho gvidis poezian atelieron kie, kaj per siaj propraj poemoj kaj per aliulaj verkoj, li klarigis al ni la poezian esencon. Taŭga komplemento de tiu kurso estis la deklamada ateliero de Miguel Fernández. Tiukaze la vidpunkto transiris el la verkista flanko al la deklamista parto de la afero. Kaj tria ateliero, kiu kunigis prozon kaj poezion, estis la traduka ateliero gvidata de Antonio Valén. Aldoniĝis al la tre saĝaj klarigoj de la gvidantoj la interesegaj komentoj de la partoprenantoj, ĉefe, ĉar tiuj gvidantoj partoprenis kiel „lernantoj” ankaŭ la aliajn atelierojn. Do imagu, kio povas esti sidi ĉe Jorge Camacho, Miguel Fernández kaj aliaj fakuloj kiel Liven Dek en la traduka ateliero de Antonio Valén!

Estis ankaŭ kelkaj interesaj prelegoj, kiujn mi povis ĉeesti: José María Salguero (Kani) kaj Andy Hernández prelegis pri Vikipedio, Pedro Hernández pri Mongolio, kaj Ana Manero prezentis la interesegan projekton Bitoteko (pri enretigado de esperantaj dokumentoj kaj libroj). Nova formo de prelegado, peĉakuĉo, permesis fari 7 sinsekvajn prelegojn en malpli ol unu horo. Bedaŭrinde, tiu formato estas tro rigida (20 bildoj, kiuj daŭras po 20 sekundoj) kaj iomete streĉiga kaj por la prelegantoj kaj por la ĉeestantoj. Mi komprenas, ke la celo estas, ke la prelegantoj ne longigu la aferon, sed estus pli bone se oni donus pli da libereco al la parolanto kadre de la maksimuma tempo.

Vespere oni havis ankaŭ buntajn aferojn: teatraĵo de Georgo Handzlik, filmo, kaj koncertoj (la ĥora kvaropo Sinkopo, Georgo Handzlik kaj Kimo).

Okazis kurso por komencantoj, KER ekzamenoj kaj prelego en la hispana pri Esperanto por la vilaĝanoj.

La ĉefa aranĝo estis la interesega debato inter Renato Corsetti kaj Jorge Camacho pri lingvo kaj movado tre bone moderigita de Toño del Barrio. Tiu debato, kaj ankaŭ multaj aliaj prelegoj, estis rekte elsenditaj rete.

Mi mallonge (kaj sufiĉe malbone) prezentis la venontan Katalunan Kongreson de Esperanto kaj la Muzeon de Esperanto de Subirats kadre de la publika prezentado de asocioj kaj eventoj.

En la malpli pozitiva flanko oni rimarkis, ke la partoprenantoj estis malmultaj, nur kvindeko da homoj (plejparte hispanaj viraj mezaĝuloj), kaj ke la kongresa temo, *Esperanto 3.0 E-agado en la 21a jc.*, ne estis sufiĉe videbla kaj fakte ĝi ne rolis kiel konduka fadeno de la kongreso. Mi ne scias ĉu estas necese, ke ĉiu kongreso havu temon, ĉefe kiam la plejparto el la eventoj ne havas rilaton al ĝi.

Kiel kutime, kunmanĝado kaj bierumado estis unu el la plej gravaj partoj el la kongreso, kaj la fakto, ke estis malmultaj homoj, fakte permesis bonan interkonatiĝon inter ĉiuj gekongresanoj.

Viktoro Solé

## „ESPERANTO EN LA FREŜA AERO!”, LA SOMERA PROPONO DE LA MUZEO DE ESPERANTO DE SUBIRATS

Por elteni kelkajn varmajn vesperojn de julio, la Muzeo de Esperanto de Subirats proponis du specialajn gvidatajn vizitojn al siaj salonoj kaj tial malkovri la historion de Esperanto kaj ĝian rolon en nialanda kultura evoluo. Danke al la kolekto de objektoj kaj dokumentoj kiuj troviĝas en la muzeo, la vizitanto povis vidi la vastan literaturan produktadon en la internacia lingvo kaj la engaĝiĝon de elstaruloj kiaj Joan Amades aŭ Carles Riba en ĝia disvastigado. La propono „Esperanto en la freŝa aero!”, temis pri unuhoraj vizitoj kiuj konkludis per gustumado de loka ĉampano. La vizitoj okazis la 16an kaj la 23an de julio, je la 19a horo kaj kostis po 2 eŭroj.

MES

## KONVERSACIAJ RONDOJ EN TRINKEJO LA TERRETA

En valencia trinkejo La Terreta, situanta en la barcelona kvartalo Gràcia, ĉiumarde de la 19a ĝis la 21a estas diverslingvaj konversaciaj rondoj, en lingvoj kiuj ne oftas surstrate en Barcelono. Nuntempe, temas pri tri: la okcitana, la germana kaj Esperanto. Sed la trinkeja respondeculo emus

gastigi pliajn lingvojn. Estas po unu tablo por ĉiu lingvo, ĉe kiu parolantoj kunsidas kaj babilas. Estas rimarkinde, ke kelkaj partoprenantoj scipovas pli ol unu el tiuj lingvoj, do, depende de kiom multaj partoprenas en unu aŭ en alia tablo, aŭ laŭ la temo de la konversacia rondo, oni elektas ĉu babili germane, okcitane aŭ esperante. En ĉiu rondo, miksiĝas denaskaj kaj spertaj parolantoj (eĉ en Esperanto) kun lernantoj, do, la lingva nivelo ofte estas alta kaj tre instrua por la ne tiom spertaj homoj. Kompreneble, oni tute ne permesas krokodiladon, eĉ ne en tiuj lingvoj, kiuj ne havas specifan vorton por tiu koncepto.

La okcitanlingva televidprogramo de Barcelona TV elsendis raporton pri la trinkejaj konversaciaj rondoj ankaŭ rete spekteblan ĉe <*http://www.btvnoticies.cat/2011/07/10/info-occita-aranes-43/*>

Viktoro solé



DOLORS GODOY

*Dum la Internacia Vespero en Nitra katalunaj reprezentantoj organizis 10-homan ĥoron kun gitaristo kaj, laŭ la iniciato de nia samasocianino Dolors Godoy, kantis laŭ tri voĉoj la havankanton „El meu avi” [Mia avo] post klarigi la originon kaj la signifon de la kanto.*

## INTENSA SOMERA KURSO DE ESPERANTO EN BARCELONO

De la 11a ĝis la 22a de Julio okazis, en la barcelona sidejo de Kataluna Esperanto-Asocio (ĉe Espai Ciemen), unua Intensa Somera Kurso de Esperanto. Dum tridek fruktodonaj horoj la lernantinoj povis akiri la bazajn konojn de la Internacia lingvo kaj ekgustumi ties kulturon kaj apartaĵojn.

Ramon Rius

## SOMERA ESPERANTO-STUDADO EN NITRA, SLOVAKIO

Jam okazis la kvara malvirtuala renkontiĝo organizita de Lernu! en la belega historia slovaka urbo Nitra, 80 km oriente de Bratislavo, de la 30a de julio ĝis la 7a de aŭgusto. Entute partoprenis 189 homoj (la sama kvanto kiel en la antaŭa jaro) kaj ĉeestis 12 katalunoj (inter ili 4 KEA-anoj) kaj homoj el aliaj 27 landoj.

Okazinta en la Universitato Konstatino la Filozofo, la aranĝo same kiel en la antaŭaj jaroj, baziĝis sur lernado de la lingvo. Ĉijare estis kvin klasĉambroj (unu pli ol pasintjare) laŭ la oficialaj niveloj A1, A2, B1, B2 kaj C1. Krome estis ankaŭ interesega kurso por instruontoj nomita Flugiloj de Interkultura Vento.

Matene estis instruado kaj posttagmanĝe diversaj allogaj agadoj: prelegoj pri malsamaj temoj (lingvoj, informadiko, tarokaj ludkartoj ktp), mallongaj kursoj pri lingvoj, dancado kaj kantado, kaj konversaciaj rondoj. Ankaŭ estis eksursoj al kelkaj mirindaj slovakaj urboj. Post vespermanĝo, koncertoj de tradicia slovaka muziko, La Perdita Generacio, Julián Hernández kaj Asorti amuzis la homojn.

Kiel kutime, la manĝaĵoj ne estis tro luksaj (plejparte temis pri terpomo kun terpomoj), la vetero sufiĉe malvarma sed la etoso ja estis bonega. Dum la Internacia Vespero katalunaj reprezentantoj organizis 10-homan ĥoron kun gitaristo kaj, laŭ la iniciato de nia samasocianino Dolors Godoy, kantis laŭ tri voĉoj la havankanton „El meu avi” [Mia avo] post klarigi la originon kaj la signifon de la kanto.

Dolors Godoy kaj Viktoro Solé

## EN LA INTERNACIA INFANA-JUNULA KONGRESETO

***La Internacia Infana Kongreseto 2011 okazis en la urbeto Hundested, norda parto de Danio de la 23a ĝis la 30a de julio kadre de la Universala Kongreso de Esperanto***

Montse Brugués Puerta 7-jara, Joan Gestí Franquesa 15-jara kaj Andreu Gestí Franquesa 10-jara estis la infanoj el Katalunio kiuj partoprenis, amuziĝis kaj parolis esperante en la 42a Internacia Infana-junula Kongreseto kies temo estis la vikingoj.

Matene la infanoj lernis Esperanton kaj aliajn amuzajn aferojn en luda etoso. Post la manĝotempo ni povis pli trankvile ludi ludojn el diversaj mondopartoj aŭ kanti, ekskursi, ripozi... Posttagmeze okazis viglaj ludoj rilate al vivo de la iamaj vikingoj. Neforgeseblaj estis la vesperaj programoj kaj la merkreda ekskurso kiam ni vizitis amuzparkon kaj naĝejon!

Vidu nian programon kaj bildojn ĉe <*http://bertosch.free.fr/iik2011/programo.html*>

Joan Gestí

## NOVA EJO EN LLEIDA

***Inaŭguro de La Brokanteria, ejo por socia engaĝiĝo, ekologio kaj Esperanto en Lleida***

La venontan 3an de septembro je la 17a okazos inaŭguro de La Brokanteria. La ejo celas esti ne nur vendejo sed renkont-loko kultura kaj asocia malfermita al temoj kiel Esperanto, ekologio, socia engaĝiĝo, spirita vivo, homaj rajtoj, kunagado k.a.

- La Brokanteria
  Carrer Caldereries 9,
  al costat de la Seu Nova
  Lleida (Segrià)
  Tel. 664517173
  k.berga@gmail.com

Karles Berga

## KATALUNA PARTOPRENO EN LA 96A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

***Internacia Movada Foiro, sabaton la 23an de julio en la kongresejo Bela Center en Kopenhago***

Sabaton la 23an de julio, Kataluna Esperanto-Asocio starigis budon en la Internacia Movada Foiro kadre de la 96a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago. La asocio proponis eldonaĵojn, afiŝojn kaj flugfoliojn. Ekde la unua tago de la kongreso, en kiu 1600 kongresanoj partoprenis, oni informadis pri la situacio de la Kataluna Landaro kaj de la kataluna lingvo, pri la celoj, valoroj kaj principoj de Kataluna Esperanto-Asocio kaj ĉefe pri la 36a Kataluna Kongreso de Esperanto, okazonta en Barcelono inter la 28a de oktobro kaj la 1a de novembro.

Montserrat Franquesa

MONTSERRAT FRANQUESA




## KEA ALVOKAS LA AŬTORITATOJN KAJ LA CIVITANARON DEFENDI LA KATALUNAN KONTRAŬ LASTAJ AGRESOJ

La ĵusa deklaro de la nova prezidanto de Aragono, Luisa Fernanda Rudi, kie ŝi komunikas la nuligon de la Leĝo pri lingvoj de Aragono, febla klopodo por la digno de la kataluna kaj de la aragona, kulminas amasmedian kampanjon ne nur kontraŭlingvan sed ankaŭ ksenofobian kaj aldoniĝas al la lastaj agresoj de la Popola Partio kontraŭ la kataluna lingvo en Valencilando kaj en la Balearaj Insuloj.

Antaŭ tiu minaco, Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) volas diskonigi la sekvan komunikon:

Ni denuncas la atakojn kontraŭ la katalunlingvanoj de Valencilando, la Balearaj Insuloj kaj la Aragona Strio, kaj la antaŭan ksenofobian kampanjon okazigintan por la pravigo de tiu lingvomortiga klopodo.

Ne temas pri atako al la katalunlingvanoj de unu konkreta teritorio sed pri atako al la kataluna lingvo ĝenerale kaj sekve, ni petas ĉiujn aŭtoritatojn de la Kataluna Landaro kaj la civitanaron ekagi ĉiel necese por eviti la politikigon de la lingvo kaj ĉesigi tuj la atakojn.

Malobservi lingvajn rajtojn estas malobservi homajn rajtojn.

Kataluna Esperanto-Asocio, 14an de julio 2011

## ESPERANTO.CAT CRIDA A LES AUTORITATS I A LA SOCIETAT CIVIL A DEFENSAR EL CATALÀ DAVANT LES AGRESSIONS

Les recents declaracions de la nova presidenta d'Aragó, Luisa Fernanda Rudi, en la que va anunciar la derogació de la Llei de llengües a Aragó, un tímid intent de dignificació del català i l'aragonès, segueixen una campanya mediàtica no només de caràcter lingüicida sinó xenòfob i se sumen a les agressions que el Partit Popular ha dut a terme recentment contra la llengua catalana al País Valencià i a les Illes Balears.

Davant d'aquestes amenaces, l'Associació Catalana d'Esperanto (Esperanto.cat) vol fer públic el següent comunicat:

Denunciem els atacs contra els catalanoparlants del País Valencià, de les Illes Balears i de la Franja de Ponent, i la prèvia campanya de xenofòbia que s'ha dut a terme per justificar aquest intent de lingüicidi.

No es tracta d'un atac als catalanoparlants d'un o altre territori sinó a la llengua catalana en general i en conseqüència, també instem a totes les administracions dels Països Catalans i a la societat civil a emprendre totes les accions necessàries per evitar la politització de la llengua i aturar immediatament les agressions.

La violació dels drets lingüístics és una violació als drets humans.

Associació Catalana d'Esperanto, 14 de juliol de 2011